# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

PRIEURE SAINT-MARTIN
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns 76000 ROUEN
Sekr: F-ino G.PREUX 55/3 Terrasse Rue du 11 novembre 59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue de Milngavie 49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L.BOURDON 7, av. Salomon 59800 LILLE
Peranto IKUE: P-ro R.DEGRELLE 12,r. Estienne d' Orves 54490 PIENNES

C.C.P.: Association Catholique Française pour l'Esperanto 2 324 93 N ROUEN.

==== la nº: 8 F. Abono: 30 F (TTC). Kotizo: 10 F. Sume: 40 F. ====
xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

==== Nº 182 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== SEPTEMBRO 1994 ====
xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.
xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## LE MOT DU PRESIDENT

Comme chacun sait, l' année 1994 est celle de la famille. Les premiers chrétiens avaient pour coutume de la nommer Petite Eglise. En effet, les relations entre les membres d' une famille sont semblables à celles qui unissent les fidèles de l' Eglise dans la charité et l' unité, sous la direction de l'Esprit.

De nos jours, la famille apparaît en crise, mais reste, malgré les soubresauts qui l' agitent souvent, une valeur sûre, surtout si elle s' ordonne autour des vertus chrétiennes, gages de sa pérennité et de son harmonie.

Elle reste le fondement et la base de la société et ne saurait disparaître sans que s' effondre aussi la civilisation humaine dont elle est le ciment et le soutien.

Les espérantistes forment aussi une grande famille et il serait souhaitable qu' en constatant l' amitié qui les unit, l' on puisse dire également qu' ils sont une Petite Eglise. Nous le savons tous, derrière la pratique de la Langue Internationale se profile l' "idée interne", c' est-à-dire la considération et l' estime réciproque qui lie les espérantistes entre eux. N' est-il pas réconfortant de voir dans nos congrès internationaux des espérantistes de sensibilités diverses se comporter comme des amis oublieux des querelles qui agitent le monde et attentifs à vivre, surtout s' ils sont chrétiens, la tolérance si nécessaire aujourd' hui?

A.B.

## LA BILETO DE LA PREZIDANTO

Kiel sciate, la jaro 1994 estas tiu de la familio. La unuaj kristanoj nomis ĉi tiun "Eta Eklezio". Efektive, la rilatoj inter familianoj similas tiujn,

../...

kiuj unuigas la eklezianojn en karito kaj unueco, sub la gvidado de la Spirito.

Nuntempe, la familio spertas krizon, sed, malgraŭ siaj skuoj, restas sekura, ĉefe se ĝi observas la kristanajn virtojn, kiuj garantias ĝian daŭrigon kaj harmonion. Ĝi restas la bazo de la socio kaj se ĝi malaperus, disfalus ankaŭ la homa civilizo, kies cemento kaj apogo ĝi estas.

Ankaŭ la esperantistoj formas grandan familion, kaj estus dezirinde, ke, konstatante la amikecon, kiu ilin unuigas, oni povu diri:"Ili estas Eta Eklezio". Ni ĉiuj scias, ke, malantaŭ la praktiko de la Internacia Lingvo, siluetiĝas la "interna ideo", t. e. la konsidero kaj la reciproka estimo, kiu ligas la esperantistojn. Ĉu ne estas kuraĝige vidi en niaj Universalaj Kongresoj diverssentajn esperantistojn vivi kiel amikoj forgesantaj la mondajn kverelojn kaj xxxxx provantaj, ĉefe se ili estas kristanoj, montri toleremon tiel necesan hodiaŭ?

A.B.

---

PROTOKOLOJ DE LA KONGRESAJ KUNVENOJ EN MOULINS-lès-Metz

ĜENERALA KUNVENO: 15-an de majo 1994.

Prezidas S-ro Bessière, kiu legas la salutleterojn ricevitajn de M-ro Raffin, episkopo en Metz, S-ro Wasilewski el Varsovio kaj Pastoro Burkhardt, prezidanto de K.E.L.I.

S-ino Vincent kaj S-ro Colleu donas la rezultojn de la balotado: voĉdonis 36; nur 31 validas.

Agadraporto: 30 aproboj, 1 kontraŭ
Financa raporto: 27 aproboj, 4 sindetenoj
Renovigo de 1/3 de la komitato:
S-ro Bessière 30 P-ro Bourdon 31 S-ro Colas 31
S-ro Despiney 31
Sekve ĉiuj estas reelektitaj.

La venontjara kongreso okazos en Limoges de la 19-a ĝis la 23-a de majo.

La ĵus eldonitan informilon oni prezentas kaj disdonas al la ĉeestantoj. Por ricevi pliajn ekzemplerojn, oni skribu al S-ro Bessière.

S-ro Colleu konsentas iĝi peranto de I.K.U.E. ekde la 1-a de januaro 1995.

KOMITATKUNVENO: 16-an de majo

Ĉeestis: P-ro Bourdon, F-to Marmou, F-ino Preux, S-ino Vincent, S-roj Bessière, Colas, Despiney kaj Lafargue.

Petis senkulpigon: P-roj Degrelle kaj Héroux, S-roj Pons kaj Villeneuve.

La komitato komencis la preparon de la kongreso en Limoges, kiu okazos en la seminario. Oni prezentos detalan programon en oktobro.

Ekde 1995, estos du kongreskotizoj: 60 F (90 F por geedza paro) ĝis la fino de februaro, 80 F (120 F por paro) post tiu dato.

La asocia kotizo restas senŝanĝa: 40 F (50 F por paro)

La venonta komitatkunveno okazos la 19-an de oktobro 1994 ekde la 14.00 en la monaĥejo S-ta Jakobo 20, rue des Tanneries 75013 PARIS; bonvenaj estas observantoj.

---

NIA MEMBRARO

Novaj membroj 1994: 11 kaj 12) G-roj LEVAL (Allier)

Tutkoran bonvenon al ili!

IKUE-anoj: 19) G-roj SEGUIN; 20) F-ino MARTIN; 21) G-roj LEVAL; 22) P-ro GOUDE;

ROZKOLORA KAJERETO: S-ro Despiney ĝojas anonci la naskiĝon en junio 1994 de lia pranepino FLORA.

Gratulojn al la gepatroj kaj longan feliĉan vivon al la bebo!

N.B. Ne hezitu informi la redakcion pri viaj familiaj novaĵoj. Antaŭdankon.

PRI LA KORANO (daùrigo)

LA ELIRO AL MEDINO KAJ LA KOMENCO DE LA ARABA ISLAMA IMPERIO (622-632)

En 622, la malfacilaĵoj ne solviĝas, la tuta islama eta komunaĵo iras al la oazo de Medino, situanta je 400 km pli norde. Antaùa konsento kun reprezentantoj de pluraj paganaj arabaj triboj estis preparinta la vojon al tiu eliro - en araba lingvo HIJRA, de kie devenas la vorto Hegire. Tiuj triboj, kiuj formis la duonon de la oaza loĝantaro, aniĝis al Islamo kaj konvertiĝis, akceptante, ke Muhammad fariĝu la politika ĉefo de la oazo. La alia duono, konsistanta el tri arabaj judaizintaj triboj, akceptis sen entuziasmo protektoraton el kiu pli poste ĝi vane provis liberiĝi. Pro tio oni elpelis du judajn tribojn en 624 kaj 625 (v. suraon 59, 1-18), kaj, en la tria tribo, oni masakris la virojn kaj vendis, kiel sklavojn, la virinojn kaj infanojn en 627 (surao 32, 24-26).

Muhammad impresis pro siaj kvalitoj de ŝtata ĉefo, kiuj aldoniĝis al lia propra imponeco. En Medino la koranaj orakoloj estis proklamitaj de li, enante al la konfliktoj kun la paganoj de Mekko, eltirante la instruon el la venkoj kaj ankaù el la malvenkoj, promulgante leĝaron por finaranĝi la esencajn punktojn de la socia vivo (edziĝo, milito, kontraktoj, heredo, predo, ktp). La militoj vere komenciĝis nur en 624, per la batalo de Badr, dum la muzulmanoj unuafoje venkis la Mekko-loĝantaron. Poste estis tiu de Ohod (625). En 627, Medino estis sieĝata kaj poste malbarita. Unuvorte, en malpli ol ses jaroj, la islamaj militistoj inversigis la situacion. La entuziasmiga aspekto de epopeo travivita nome de Dio, kun iom poste la sukcesoj kaj akiraĵoj, elforĝis la unuecon de la komunaĵo. Mekko estis rekaptita de la muzulmanoj en 630: konvertiĝoj kaj kungrupigoj amase okazis.

En 631, Islamo superis centran Arabion kaj ekeniris ĝis Jemeno, sude, kaj ankaù proksime al Palestino. Islamo, de nun, prezentis sin kiel la eterna neŝanĝebla religio, tiu, kiun estus instruinta tute egale la antaùaj profetoj, inkluzive de Moseo kaj Jesuo, kaj kiun iliaj disĉiploj estus fine ~~xxx~~ misigintaj. Muhammad venis por redoni tiun neŝanĝeblan religion kaj anonci ĝin al la tuta mondo.

La lastaj monatoj de la vivo de la profeto vidis lian triumfan pilgrimon al la sanktaj lokoj de Mekko, ĉe la kapo de sia popolo (632). Li mortis en Mekko en junio 632. Lia posteulo devis fronti grandegan ribelon de Arabio, kondukitan de aliaj "profetoj", kies cirkonstancaron oni ne konas. Ŝajnas, ke temas pri monoteistoj, moviĝantaj en etoso pli-malpli baptista. Ili levis sin nome de Dio, "Ralmàn", la senfine bona kaj pardonema. Tiu nomo de juda deveno (v. Talmudon de Babilono) troviĝas sur kelkaj sudarabikaj, judaj, kristanaj enskribaĵoj. Korano uzas ĝin en iu periodo de sia predikado, sed poste forapartigas ĝin en la dua plano antaù la opono, kiun manifestis al ĝi la paganoj de Mekko. Tamen ĝi reaperis kaj nun ĝi okupas en Islamo unuarangan lokon.

(daùrigota)

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

LA KATAKOMBOJ (daùrigo)

Post la r bo de Romo (410) fare de Alariko, reĝo de la Ostrogotoj, la katakomboj perdis sian tombejan naturon kaj iĝis kultadejoj; pli poste, en la VI-a jc, ili estis ruinigitaj de la Gotoj kaj, post du jarcentoj, de la Lombardoj. Ĉar la kadavroj de la sanktaj korpoj estis transportitaj en la preĝejojn, la katakomboj ĉesis esti pilgrimejo kaj estis iom post iom forlasitaj. Nur tiu de sankta Sebastiano estis konata. Nur ekde 1593 romana arkeologo, Antonio Bosio, entreprenis esploradon de la katakomboj kaj publikigis "Roma Sotteranea" (Subtera Romo), kiu signis decidan etapon de la kristana arkeologio. La prifosadoj de tiam ne ĉesis. Freŝdataj esploroj estis faritaj sur la "Via Apia", proksime al sankta Sebastiano: ili pravigis la tradicion laù kiu la korpoj de sanktaj Petro kaj Paùlo estis tie portempe demetitaj.

Kristano ne povas penetri laùlonge de tiuj mallarĝaj trairejoj, kie regas odoro de ŝviteta kelo kaj de bruligita vakso, ne havante impreson je fremda ĉeesto.

Tutajn horojn oni povas rigardi senlace tiujn longajn niĉojn elkavigitajn el la rokvandoj, tiujn "loculi", el kiuj ĉiu ŝirmis korpon reviviĝontan.

../...

Proksimigante flamon al la vando aŭ al la volbo, oni ekvidas strangajn figurojn, kiuj spegulas niajn pribibliajn rememorojn: Moseo frapanta la ŝtonegon, Danielo en kavo de leonoj, Jona elvomita el la interno de la fiŝo aŭ la Bona Paŝtisto inter du ŝafidoj. Nur en la II-a jc. aperos figuroj de Kristo kaj de la Sankta Virgulino.

Tie kaj tie ĉi vidiĝas sur la vandoj interplektaĵo de laŭbornamoj, de birdoj kaj de foliaro kun delikataj koloroj. Kaj oni emocie malkovras en la duonlumo ne- aŭ fam-konatajn nomojn plej ofte malbele grifelitajn sur rompaĵo el bakita argilo aŭ sur stukita ŝtono, nomojn de niaj prafratoj flankitaj samkiel refreno de la du vortoj de espero:"in pace".

La tuta vivo de la unuaj kristanoj, ilia pieco, ilia komuna sento, ilia singardo de inside postsekvitaj homoj kaj ilia pacienca kuraĝo tie postvivas, kiel vivanta memorsigno en tiuj nekropoloj.

laŭ Daniel Rops en "L' Eglise des Apôtres et des Martyrs", p. 226 kaj sekvantaj.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

LA KRISTANA ORIENTO (daŭrigo - v. FKE nº 180)

El la haveno de Antioche, iam konstruita de la Seleŭcidoj ĉe la Oronta elfluejo, necesis du semajnoj por atingi Efezon, somere, en bela vetero, per tiuj multaj ŝipoj, kiuj laŭiris la bordon kaj haltis en la ĉefaj maraj urboj.

Elŝipiĝante sur la marmorajn kajojn de la haveno de l' belega urbo, tiu "perlo de Ionio prilumita de la plej bela lazura lumo, privilegiita de l' plej bona konata klimato", laŭ Herodoto, ĉu la Virgulino kaj S-ta Johano sentis la admiron de la vojaĝintoj antaŭ la spektaklo, kiun ili vidis?

La urbo etaĝiĝis sur la deklivoj de harmoniaj montetoj. Ĝia plano, konceptita de Lizimako laŭ peto de Aleksandro la Granda, valorigis ĝiajn ĉefajn monumentojn, i.a. unu el la "sep mondaj mirindaĵoj": Artémision, sanktejo de la plurmama Artemisa, la romiana Diana.

La du vojaĝintoj certe uzis la grandan slabitan straton, borderitan per kolonvicoj, reĝa vojo, kiu kondukas de la haveno al la "urbocentro" kaj finiĝas ĉe la vasta teatro, kiun S-ta Paŭlo baldaŭ uzos kiel tribunon.

La Virgulino Maria probable trovis kvietecon kaj bonajn kondiĉojn por preĝi kaj mediti en loĝejo malproksima de la urba bruego. La tre verŝajnajn ruinojn de tiu domo oni malkovris fine de la XIX-a jc, dank' al la riveloj de Catherine Emmerich. Ni ree parolos pri tio.

Se oni akceptas la ĉeeston de la Virgulino en Efezo kun S-ta Johano, kaj se oni lokas ŝian ĉieliron en tiu urbo aŭ ĉirkaŭe, oni ne povas precize fiksi la daton de tiuj okazaĵoj. Tre singarde, oni povus reteni proksimume la jaron 46 kiel tiun de la ĉieliro. Tri elementoj pravigus tiun elekton:

1. Johano estus forlasinta Efezon por Jerusalemo en 46, ĉar li estis en Jerusalemo por "la kunveno", verŝajne en 49;

2. tradicio tiel respektinda kiel nekonfirmebla asertas, ke la Virgulino estus forlasinta la mondon en la aĝo de ĉirkaŭ 60 jaroj;

3. tiun kronologion adoptis C. Emmerich.

La ĉeesto de S-ta Johano en Jerusalemo ĉirkaŭ 46 estas serioza hipotezo. En sia epistolo al la Galatoj, S-ta Paŭlo asertas tiun fakton, despli rimarkindan, ke ĝi estas la sola fojo, kiam Paŭlo citas Johanon, Apostolo de Azio (Gal. 2, 1-9) Tiu precizigo venas el parto de tiu Epistolo, en kiu Paŭlo sciigas, ke 14 jarojn post sia konvertiĝo (32), li "supreniras" al Jerusalemo kun Tito kaj Barnabo por renkonti tiujn, kiujn oni "konsideris kolonoj (de l' Eklezio): Petro, Johano kaj Jakobo, la "frato de l' Sinjoro". Tiu renkonto celis kaj atingis doktrinan konsenton kaj limdifinon de la respektivaj apostolaj agadkampoj de la apostoloj: al Paŭlo, la konvertiĝo de l' Nacioj (paganoj), al Petro kaj Johano tiu de la Judoj. Kiel signon de komuneco, Petro, Jakobo kaj Johano etendas sian dekstran manon al Paŭlo.

(daŭrigota)

## "POR VI, KIU ESTAS MI?"

Sinjoro,
kiam, ĉe la vojkruciĝo,
en la tempo de la gravaj decidoj,
mi hezitas pri la sekvenda direkto,
dividite inter jes kaj ne,
timo kaj kuraĝo,
vi ree demandas min,
kun granda delikateco:
"Por vi, kiu estas mi?"
Sinjoro,
mi opiniis, ke mi konas vin,
sed vi ĉiam estas neantaŭvidebla,
skandala kaj aminda!

mi ja scias, ke viaj pensoj
ne estas miaj pensoj,
ke vi "vidas" ĉion
laŭ senlima skalo,
sed kelkfoje
mi malfacile vin "sekvas"!
Kaj se, foje, mi ribelas
antaŭ tiuj krucoj plantitaj
sur la vojo al Pasko,
donu al mi la lumon de la kredo
por certiĝi, ke paŝi post vi
ne kondukas al iu sakstrato,
sed al la Vivo de via Regno.

el "Prier au quotidien", n° 134.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## LA 79-a U.K. en SEULO

Post 12-hora flugo ekde Paris, super norda Eŭropo, Siberio, azia Ruslando kaj Japanujo, mi atingis la korean ĉefurbon kaj ties varmegon.

La klimatizado de la kongresejo faciligis la partoprenon en la riĉa programo, kaj tiu de la aŭtobusoj igis la ekskursojn pli agrablaj.

Ankaŭ la preĝejo, kie okazis la ekumena diservo, estis klimatizita, kaj dum tuta horo, ni kviete ĝuis la kanton de la loka vira ĥoro, tiun de la virinoj kun piana akompano, la orgenludadon, la virinan orkestron de mandolinoj kaj etaj harpoj de alia paroĥo, kaj fine la trumpeton de solistino, entute veran koncerton. Lerte gvidis la diservon bona esperantisto korea. La predikanta pastoro bedaŭrinde ne havis la saman lingvan nivelon, kaj verŝajne pro tio, ni antaŭe ricevis la tekston de lia prediko.

Ĉe la fino, katolika pastro invitis al eŭkaristio: duope alvenis la homoj, kaj ĉiu komuniis la partneron per pano trempita en la vinon. Ĉu oftas tiu rito em katolikaj preĝejoj? Mi vidis ĝin la unuan fojon.

Kion diri pri Koreujo mem? Ĝi estas la "lando de la kvieta mateno" kaj havas 5000-jaran historion kaj riĉan civilizon. Komence la sola religio estis ŝamanismo; poste venis budhismo, fine kristanismo. La plej multaj koreoj estas protestantoj, kaj abundas protestantaj preĝejoj en la tuta lando. La turistgvidantoj montras nur la budhistajn templojn, kiuj certe posedas pli tipan arkitekturon, tamen al mi plaĉus eniri almenaŭ unu kristanan preĝejon.

Ne eblas en duonpaĝo doni ĉiujn impresojn, sed se vi havas specialajn demandojn, skribu al mi, kaj mi provos respondi en la venonta bulteno.

Jeannine VINCENT.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## REDAKTORINA ANGULO

Plej volonte mi ricevos artikolojn, ne nur religiajn, sed ankaŭ pri aliaj temoj, kiuj povas interesi ĉiujn: historio, geografio, raporto pri vojaĝo, botaniko, faŭno, kutimoj en diversaj landoj, receptoj pri kuirarto k.s.

Se vi legas interesan artikolon, sendu ĝin al mi.

Antaŭdankon.

KASISTINA ANGULO

Ĉoje mi dankas la anojn, kiuj reagis al mia "lasta alvoko", ĉu pagante sian ŝuldon, ĉu rezignante je plua membreco (mi ja preferas ricevi negativan reagon ol nenion!), kaj speciale gratulas tiujn, kiuj spontane kaj afable aldonis sumeton por iel kompensi sian malfruon.

Sed ankaŭ silenton mi ricevis... de 19 el vi, supozeble NE-legantoj de la bulteno. Kial sendi ĝin al ili?

Kiel mi anoncis sur la lasta paĝo de la n° 181, ili de num nenion plu ricevos... krom se ili subite vekiĝos...

Kiel vi povis legi p. 2, la asocia kotizo restas senŝanĝa, t.e. 40 F por unuopulo, 50 F por geedza paro, kaj vi jam num rajtas sendi ĝin. Tiuj, kiuj pagos antaŭ la 31-a de decembro 1994 ricevos donaceton.

J.V.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

KOTIZTABELO 1994

I.K.U.E. kun "Espero Katolika" 150 F
Peranto: P-ro R. DEGRELLE p.ĉ.k. NANCY 2 555 38 L.

----------

| | | |
|---|---|---|
| A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" | unuopulo | 40 F |
| | geedza paro | 50 F |
| infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o | | 20 F |
| | bonfaranto | 200 F |

----------

U.F.E. kun "Revue Française" kaj "E° Actualités" 270 F

U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro 300 F

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

ENHAVO

1. Le mot du président
2. Kongresaj protokoloj
Nia membraro
3. Pri la Korano
La katakomboj
4. La kristana Oriento
5. "Por vi, kiu estas mi?"
La 79-a UK en Seulo
6. Kasistina angulo

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Dépôt légal: 3ème trimestre 1994
C.P.P.A.P. n° 62 532.
Directeur: Albert BESSIERE
Directeur-délégué:
René-Jean MARMOU

Polycopié par l' A.C.F.E. (enregistrée le 6 mai 1977 à la sous-préfecture de Saumur sous le n° 2 523 bis, J.O. 23/05/1977)
au Prieuré St-Martin
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

==========================================

Lastmomente : ni eksciis pri la forpaso de P-ro Goudé. Pli ampleksa nekrologo aperos en le decembra numero. Ni preĝu por la ripozo de la animo de nia kara frato.

++++++++++++++++++++++++++